**Trejnilo de Esperanta Leksiko**
Prilaboris: **Ryszard Rokicki**

# TESTO 49

## **Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.

**1.** Neniu estas ␣ **r** ␣ **f** ␣ **t** ␣ en sia urbeto.

**2.** Sojfabo nek estas **f** ␣ **b** ␣, nek enhavas sojon: ĝi tamen estas iom faboforma, kaj el ĝi oni preparas saŭcon nomatan sojo; de tie do venas ĝia nomo, pro konvencio kaj tradicio.

**3.** Hildesheimer verkis prozon kaj dramojn, li ironias pri la enhavo de klasika edukado, ekzemple per realismaj biografioj de **f** ␣ **kc** ␣ ␣ ␣ personoj.

**4.** La ŝanĝo de la projekto kaj de la konstrulaboroj kostos cent milionojn da ĉeĥaj kronoj, por kio la registaro disponigos 45 milionojn el la ŝtata ␣ ␣ **ĝ** ␣ **t** ␣.

**5.** La ŝoseo estas malebena kaj malfacile veturebla: foje surŝoseaj ␣ **ns** ␣ **r** ␣ ␣ aŭ azeno paralizas la trafikon.

**6.** Unu tagon marrompiĝis ŝipo; kesto kun neordinaraj floraj **b** ␣ **lb** ␣ ␣ alpeliĝis al la tero kaj parton el ili oni prenis kaj metis en la kuirpoton, la aliaj kuŝis kaj putris en la sablo.

**7.** Konciza referaĵa stilo havas ankaŭ sian ␣**v**␣ **nt** ␣ **ĝ** ␣ ␣: ĝi rapide enkondukas la leganton en vastan koncernan problemaron, helpas trovi kelkajn gravajn fontojn pri la temo.

**8.** Okazos bankedo laŭ renesanca **m** ␣ **n** ␣ ␣ kun la akompano de tiuepoka muziko kaj aliaj distraj programeroj.

**9.** Kelkaj grandegaj **g** ␣ **rl** ␣ **nd** ␣ ␣ da artaj rozoj faris surprize belan efikon, precipe tial, ke ili estis metitaj en la plej neimageblaj lokoj.

**10.** La profesoro opinias, ke ␣ ␣ **n** ␣ **l** ␣ – 70 km longa – estus konstruata dum unu jaro.

## **Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.

**1.** Dum monatoj la suno ne leviĝas, estas tempo ne nur por spekti televidon, sed ankaŭ tempo por **tr** ␣ **k** ␣, teksi, kudri.

**2.** Ĉiumomente traflugis super li noktaj birdoj kaj grandaj vespertoj, la nebulo fariĝis tiel densa, ke la Harrarano devis **p** ␣ **lp** ␣ la muron, por ne perdi ĝin.

**3.** Variolo estis ĉiama **pl** ␣ **g** ␣ de la tuta homaro, mortigante ĉiun trian aŭ kvaran suferanton, blindigante multajn aliajn kaj lasante ĉiujn postvivantojn kun cikatroj sur la vizaĝo.

**4.** En la zagreba katedralo la kroata kardinalo Franjo Kuharić **b** ␣ **p** ␣ ␣ ␣ la trimonatan filon de Karlo kaj Francesce von Habsburg, heredanton de la 700-jara imperiestra krono.

**5.** Per falĉileto oni diligente tranĉadas la rizplantojn – sekiĝas la pajlo, ĉu kiel **g** ␣ **rb** ␣ ␣ en rizejoj aŭ sternita sur vojrando.

**6.** La infano ludis antaŭ la pordo, manĝis kun apetito sian vespermanĝon, iris poste dormi, kaj antaŭ mallonge ĝi vekiĝis tre **r** ␣ **ŭ**␣ ␣ kaj kun sufoka tusado.

**7.** La reta versio kostas 60% de la baza surfaca **t** ␣ **r** ␣ **f** ␣ de *Monato*.

**8.** Manĝi plurajn kernojn de **a** ␣ **r** ␣ **k** ␣ **t** ␣ kaj persiko, aŭ pli precize ilian enan molan parton, estas toksa por homo kaj la toksiĝo povas konduki al morto, nur unuavide senkiala.

**9.** En la malsanulejo *Le Molinette* situanta en la nord-okcidenta urbo Torino, okazis la (mondskale) unuafoja transplanto de **r** ␣ **n** ␣ en la lokon de lieno.

**10.** Ŝparporko estas eta, interne malplena figuro kun fendo supre por enĵeti monerojn; la materialo estas tre diversa: plasto plej ofte, sed ankaŭ ceramiko, vitro, **g** ␣ **m** ␣ ktp.

## **Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

fabel', fraz', ŝtip', izol', asert', injekt', bred', revizi', asist', aktor'.

**1.** La viruso de hepatito B precipe disvastiĝas per transfuzado de sango, sangodevenaj preparaĵoj aŭ malbone sterilizitaj medicinaj ␣ ␣ **j** ␣ ␣ ␣ ␣ **l** ␣ ␣.

**2.** Mi sidis tiutempe kune kun la aliaj en karcero, ne en la zono, kiel ĉiuj arestitoj, sed en ␣ **z** ␣ ␣ ␣ **j** ␣.

**3.** En la esplorejo *Centro Colibrì* la kolibroj ne vivas en komunaj birdejoj, sed renkontiĝas unu horon matene kaj unu horon vespere, kaj nur sub severa gardado fare de la ␣ ␣ ␣ **d** ␣ ␣ **t** ␣ ␣.

**4.** Angla esperantisto loĝanta en Irlando skribis al la organizanto de la konferenco, ␣ ␣ ␣ **r** ␣ ␣ **n** ␣ ␣, ke "la gaela estas primitiva lingvo, en kiu oni eĉ ne kapablas paroli pri informadiko".

**5.** Tamen parlamentanoj kaj iliaj ␣ ␣ ␣ **s** ␣ ␣ ␣ **t** ␣ ␣ ne konsideras la anglan lingvon kiel plian dependaĵon de la angla-usona koloniismo.

**6.** La nura gramatiko ne donas ankoraŭ la scipovon paroli, tial lernolibroj ofte donas tion, kio estas konata kiel ␣ ␣ ␣ **z** ␣ **r** ␣.

**7.** La titolo *Klimatŝanĝaj fabeloj* super la letero estis verŝajne pli trafa ol oni celis, ĉar la komentoj efektive prezentas serion da ␣ ␣ **b** ␣ ␣ ␣ **ĵ** ␣ ␣ ne bazitaj sur la realo.

**8.** Prezidanto de Sindikato de Polaj Teatroj Kazimierz Kaczor en gratulletero al Jerzy Fornal, okaze de ties 45-jara ␣ ␣ **t** ␣ ␣ ␣ **d** ␣, emfazis la meritojn kaj atingojn de Fornal en E-teatro.

**9.** La ekzekutisto ekbruligis la ␣ ␣ ␣ **p** ␣ **r** ␣ ␣, Hus ne vivis longe, kantante psalmojn kaj preĝante li rigardis al la ĉielo kaj dum mallonga tempo li sufokiĝis pro la densa fumo.

**10.** Dekstruloj kaj ␣ ␣ ␣ ␣ **z** ␣ ␣ **s** ␣ ␣ ␣, kiuj aprobas la militisman japanan historion, rigardas la sanktejon Yasukini kiel sian spiritan bazon.

**Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

**1.** Inkandeskaj ___ donas agrablan lumon, sed bezonas multe da elektro kaj produktas nenecesan varmon.

**a.** ampoloj **b.** viktimoj **c.** menuoj **d.** vezikoj

**2.** Kion diri pri la vestado de bestoj per jako, ___ kaj ĉapo?

**a.** melono **b.** vejno **c.** pruno **d.** banto

**3.** *Vikipedio* ekzistas ankaŭ en Esperanto, sed mi ___, ke preskaŭ nur la redaktantoj de tiu versio malfermas ĝin, kaj ke la konsumantoj de *Vikipedio* uzas aliajn lingvojn.

**a.** recenzas **b.** kompromitas **c.** vetas **d.** tiklas

**4.** Antaŭ niaj piedoj estis profunda faŭko, kie la rivero ___, ŝveligita de la printempaj pluvoj.

**a.** abstinis **b.** muĝis **c.** riverencis **d.** kontestis

**5.** Hodiaŭ preskaŭ neeblas vidi ___ en urbaj regionoj, tamen lastatempe populariĝis la birdo pro la libroj pri Harry Potter.

**a.** strigojn **b.** inundojn **c.** princojn **d.** ministeriojn

**6.** La situacio iĝis vivdanĝera, kaj la tri fratoj per la propra ŝipo ___ al Norvegio, kie en Tromsø Ivan antaŭ kelka tempo studis la norvegan lingvon.

**a.** aflikti **b.** bindis **c.** fuĝis **d.** blasfemis

**7.** Katastrofoj sekvis unu la alian, sed nia ŝtatestro nur ___, ke li ne faris tion, ne ordonis, eĉ ne sciis, do ne respondecas.

**a.** balbutis **b.** flagris **c.** aplikis **d.** liveris

**8.** Reprezentantoj de antikvaj tradicioj afekte konsideris la civilan edzigon nur kiel senvaloran ___.

**a.** hordeon **b.** laĉon **c.** portreton **d.** formulon

**9.** Teme tra la tuta kongreso ritmis ankaŭ *La Espero* de Zamenhof, ferme kaj malferme ĝi estis kantita en sia kutima marŝa ___.

**a.** planedo **b.** lanterno **c.** konvalo **d.** takto

**10.** Oni ne nur devis piediri, sed eĉ eltiradi la ĉevalojn el la sablo; ĉiuj vadis, eniĝante ĝis la ___, en kelkaj lokoj oni enfalis ĝis la genuoj.

**a.** himnoj **b.** maleoloj **c.** porcioj **d.** koridoroj